

Max von Schenkendorf,
O libertas cara

tradukita de N. N. 08

1. O libertas cara,
Cui sum deditus,
Veni luce clara
Velut angelus!
Non vis apparere
Mundo anxio?
Tantum vis lucere
In aetherio?

2. Umbra in fagorum,
Silva hilara,
Sub odore florum
Domus est tua.
Haec est vira pura,
Cum flat, sonitat,
Tua si natura
In nos penetrat.

3.
.....
.....
.....
.....
.....
.....

4.
.....
.....
.....
.....
.....
.....

...

Max von Schenkendorf,
Ho liber', adore

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Ho liber', adore
Mi ja amas vin,
Mi deziras kore:
Venu je la fin'!
Ĉu vi venos iam
Al ni, la homar' ?
Ĉu vi restos ĉiam
Inter la stelar' ?

2. Ankaŭ en arbaro,
Kie migras mi,
Kaj sub rev-floraro
Ja troveblas vi.
Estas vivo vera,
Kiam regas vi
Sur la rondo Tera,
Tiam ĝojas ni.

3. Kiam alrigardas
Ni amike nin,
Kiam kisoj ardas,
Amas nin knabin'...
Sed ne haltas iam
Tiu kor-dezir',
Al ĉielo ĉiam
Strebas la sopir'.

4. Venas kanto mia
El trankvila land',
Bilda idilia
Estas mia kant'.
Floras flor' ĝardena,
Estas multe da
Spikoj eĉ en jena
Ŝtona mondo ja.

...

5. Ubi Dei igne
 Capta'st antiquae
 Stirpis quae antiquae
 Est assecula,
 Ubi viri degunt,
 Qui honorem, ius
 Cum virtute tegunt,
 Tuti erimus.

6.

7. Ad nos tu convertas
 Dei studia,
 Nobis libens mergas
 Te in pectora!
 O libertas suavis,
 Numen tenerum,
 Nullum morem mavis
 Quam Germanicum.

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (*1783 - †1817) en la Latinan de N. N. 08.*

Arg-340-683 (2006-01-29 13:15:23)

5. Kie Dia flamo
 Brulas en la kor',
 Kun fidel' kaj amo
 Al la propra mor';
 Kie sin defie
 Ligas por justec'
 Kuraĝuloj, tie
 Regas liberec'.

6. Inter urbaj muroj
 Povas ŝveli kor'
 Por preĝejaj turoj,
 Por prapatra mor',
 Strebas supren tiam
 Lumen al altec',
 Pretas morti, kiam
 Vokas liberec'.

7. Ho, efektivigu
 Dia la favor',
 Plene profundiĝu
 En la homa kor'.
 Ho liber', aminda,
 Kara estas vi,
 Ege dezirinda,
 Venu vi al ni!

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (*1783 - †1817) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-01-29.*

MR-445-1 / Arg-340-682 (2006-02-01 16:00:35)

La kanto estas kantata laŭ la melodio de Karl Groos (1789 - 1861).